

# VESPERTO



## LITERATURA FOLIO

Numero:212 .  
Januaro 2010.

18-a jarkolekto

### Redaktanto:

Apáti Kovács Béla  
Kaposvár  
Béla király u. 44.  
H-7400 HUNGARIO  
Telefona: 82/ 410-664  
Retadreso: [espBELA@t-online.hu](mailto:espBELA@t-online.hu)  
Eldonanto: Kaposvara Esperanto  
Centro  
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

## 2010

Antaŭ ni estas nova jaro. Ĝi estas esperplena. Ni ankoraŭ ne scias, kion ĝi alportos al ni. Ĉu pacon aŭ militon?

Ni estas geesperantistoj do ni esperas. Ni kredas, ke ankaŭ la mondo pliboniĝos kaj sur la tuta tergloblo ĉie regos paco. Ni esperas, ke finfine nia amata lingvo fariĝos la trezoro de la homaro.

Necesas esperi kaj kredi la bonon kaj belon.

Mi scias, ofte tio estas tre malfacila.

Certe ankaŭ en 2010 ni aŭdos pri krimoj kaj katastrofoj. Ankaŭ en 2010 estos tiuj, kiuj atakos la zamenhofan lingvon pruvante, ke per ĝi oni ne povas komuniki sekve ĝi estas senutila.

Jam delonge daŭras tiu ĉi „milito”.

Ni esperu, ke en 2010 ankaŭ niaj malamikoj komprenos Esperanto ne estas kontraŭ ili, sed ĝi servas la pli bonan komprenon en diversaj internaciaj rilatoj.

De ni, homoj dependas la estonto de Esperanto. Por la tuta homaro ĝia malapero estus grava perdo. Tial ni klopodu, ke la tendaro de la geesperantistoj multobliĝu kaj nia lingvo helpu nian ĉiutagan vivon.

Esperable Vesperto estos Via ŝatata monata revueto ankaŭ en 2010, kaj Vi helpos min en la redaktado.

-Redaktanto -

## Plendo de esperantisto

Junage mi ellernis Esperanton. Tiam mi kredis, ke en la estonto malaperos la lingvaj malfacilaĵoj el mia vivo. Mi tre esperis. Min sekvas ĉiu kaj la homoj lernos la Internacian Lingvon.

Bedaŭrinde mi rapide seniluziĝis, ĉar la homoj ridetis pri mi.

Vane mi provis pruvadi la utilojn de Esperanto. Ĉiam estis homoj, kiuj ne kredis min, eĉ mi estis primokita.

Kial? Mi demandis de mi. Sed mi ne ricevis respondon.

Mi estas hungaro, kaj konate nia lingvo ne apartenas al la grandaj mondlingvoj. Por ni estus necese helplingvo per kio ni povus komprenigi nin en la mondo. Tamen miaj samlandanoj multaj estas kontraŭ Esperanto. Mi ne komprenas ilin. Kial ili kontraŭas la disvastiĝon de la Internacia Lingvo?

Sen ĝi ni devas ellerni plurajn mondlingvojn por ke ni ne havu lingvaj malfacilaĵoj eksterlande.

Ni devas elekti el la libera komunikado kaj la ĝismorta lingvolernado.

Kiujn ni elektu?

Ĉu ni ĉiam estos duagradaj civitanoj, kiuj nur balbutadas, se eksterlande ni malfermas nian buŝon.

Mi esperas, ni estos tiom saĝaj, ke ni elektos Esperanton.

-Ŝaŝa.



## Poezio

### Babelo

Donu al mi fabelon,  
Ĉar io almenaŭ restu,  
Ĉar io almenaŭ nestu  
En pingloza arbusto  
de mia obskura anim'...  
Kiam oni eniros Babelon  
Ĉies vinoj restos sen gusto  
Kaj ŝimos en ŝlim'!

Donu al mi intencion  
Por io ankoraŭ tremu,  
Por iun ankoraŭ emu  
Longaj ŝtonaj strataroj  
de mia vintroza intern'.  
Kiam oni deklaras komencon  
Ĉies varmo restos sen tegoj  
En frosta kavern'.

Donu al mi nenion  
Laŭ jam forgesita moro.  
Laŭ jam forgesita foro  
Eble glitos ombraro  
de mia neĝoja esper'.  
Kiam oni ektrovos la Dion  
Ĉies dioj restos sen faro  
Kaj mortos sur Ter'.  
Ivan Naumov



## Vojaĝo al Esperantujo

Ĉi somere mi feris en Esperantujo. Certe vi ankoraŭ ne aŭdis pri tiu ĉi belega lando. Ĝi situas en granda oceano sur verda insulo.

La insulanoj ĉiuj parolas Esperanton, kaj per tiu ĉi lingvo ili bonege komprenas unu la alian.

Per ŝipo mi alvenis la insulon. Belaj fraŭlinoj akceptis min en la haveno.

Tiam mi ankoraŭ ne parolis tiun ĉi interesan lingvon, sed jam en la unua momento mi sentis, ke mi konas ĝin iel. Multaj vortoj tuj estis konataj por mi. Se oni parolis al mi malrapide, tiam mi komprenis la tieajn homojn.

Ankoraŭ tie sur la insulo mi decidis ellerni Esperanton. Tion ekaŭdante la praloĝantoj ege, ege ĝojegis kaj komencis vokadi min: „Estu salutate, samideano!”

Tiuj ĉi homoj estas tro idealistaj, ili kredas la tutteran pacon kaj tian mondon, kie malaperos la lingvaj bariloj. Ilia lingvo fariĝos la dua gepatra lingvo de la homaro. Ĝi estas belega revo. Tie sur la insulo mi spertis ĝiajn utilojn ankaŭ en la praktiko.

Post kelkaj tagoj ankaŭ mi kredis ilian ideon.

Jam la duan tagon mi konatiĝis kun ĉarmulino sur la bordo de la oceano dum la sunumado. Ŝi estis simpata junulino, kaj ŝia verda, stelo-plena bankostumo tute frenezigis min. Ĝi apenaŭ kovris ŝian perfektan korpon.

Ŝi tuj rimarkis, ke mi estas fremdulo, ĉar la lokanoj ĉiuj posedis Esperanto-insignon aŭ objekton montrante, ke ili estas la adeptoj de tiu ĉi grandioza lingvo.

Tiel komenciĝis nia babilado. Mi iris al ŝi kaj mi demandis:

—Ĉu apud vi estas libera loko? Espereble mi ne ĝenas vin.

Ŝi jetis rigardon al mi kaj ekridetis:

—Bonvolu! Komprenble la bordo apartenas al ĉiu. Krome ni estas homfratoj. Ĉefe ke ni komprenu unu la alian. Ĉu ne? Kuŝiĝu samideano!

Subite mi rimarkis, ke ankaŭ ŝiaj orelopendaĵoj estas etaj verdaj steloj. Ĉio ĉirkaŭ ŝi temis pri Esperanto.

Tiam ankoraŭ por mi tio estis tro stranga. Tiuj ĉi homoj tage kaj nokte pensas pri la zamenhofa lingvo.

Nur kelkajn tagojn estis stranga por mi ilia granda entuziasmo.

Ankaŭ mi baldaŭ infektiĝis, kaj post du semajnoj jam ankaŭ mi parolis kaj pensis tiel, kiel la praloĝantoj.

Nia romano ne finiĝis oceanborde, ĉar jam vespere post la agrabla sunumado mi vespermanĝis kun ŝi en animagorda restoracio de la hotelo.

Dum mia tuta feriado mi tre bone fartis sur tiu verda insulo. La esperantista homo estas tre helpema kaj bonkora. Ilia pasio paroli pri la interna ideo. Mi konfesas, komence tio ĝenis min, sed poste mi alkitimiĝis, eĉ ankaŭ mi parolis pri ĝi al la novalvenintoj, kiuj ankoraŭ ne aŭdis pri la Internacia Lingvo.

Rapide forflugis la du semajnoj kaj mi devis hejmenvojaĝi al mia griza, monotona vivo. Mi iĝis vera, persista esperantisto. Min tute ravis mia ĉarma konatolino, kiun mi ekkonis sur la bordo de la oceano.

Kun dolora koro mi adiaŭis de tiu ĉi belega insulo, kie ĉiu parolas saman lingvon, kaj malaperis la lingvaj bariloj.

Estus bone, se la tuta terglobo verdiĝus kaj la homaro bezonus nur du lingvojn, la gepatran kaj Esperanton.

Amiko, ĉu vi diras, ke ĝi estas utopio?

Tion mi ne kredas, ĉar jam ekzistas tia verda insulo en granda oceano. Tie la homoj bonege komprenas unu la alian helpe de Esperanto.

Post mia ferio mi hejmenvojaĝis, sed ankoraŭ en la ŝiphaveno mi decidis, tuj mi revenos kaj ankaŭ mi fariĝos la civitano de tiu ĉi verda insulo. Tie ĉi la vivo estas paca kaj harmonia.

Amiko, mi invitas ankaŭ vin. Venu kun mi kaj ni translokiĝu al Esperantujo. Mi garantias, ankaŭ al vi plaĉegos tiu ĉi grandioza vivformo.

Ne hezitu! Baldaŭ mi ekiros, mi jam aĉetis ankaŭ la vojaĝbileton.

Sed nur tien.

-Apáti Kovács Béla-



## Por infanoj

### Frostotrema birdeto

Somere gaje vivis la birdeto. Ĝi ne pensis pri la frosta vintro. Ĝi nur ridetis, kiam la aliaj birdoj proponis al ĝi aĉeti varman mantelon.

Sed rapide alvenis la vintro. Ĉion kovris granda neĝo kaj glacio. La bestoj vestis sin varme. Nur la birdeto frostotremis sur la branĉo de la granda kverko en la arbaro.

-Mi frostiĝas. Mi frostiĝas - diradis.

Alflugis ĝin la korvo kaj moke diris:

-Ni avertis vin aĉeti varman mantelon, sed vi prididis min. Nun vi meritas vian sorton.

Ankaŭ la paseroj pepadis al ĝi: -Hi-hi-hi, la birdetoj frostotemas. Ni ne malvarmas, ĉar ni havas varman mantelon.

Fine venis laolda strigo oĉjo kaj kompatis ĝin.

-Venu kun mi, en mia birdokaverno vi trovos ŝirmejon kontraŭ la vintro, sed promesu al mi, ke somere vi aĉetos varman mantelon, por ke en la sekva vintro ne frostotremu.

La birdeto helice akceptis la helpon, kaj senpacience atendis la someron, kiam en la arbara foiro oni vendos varman mantelon por la birdoj.

-Onklo Adalberto-

## Nia foto



Nokta Kaposvár

